**************************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2022/02 (decembro 2022)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

**************************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj,

Baldaŭ finiĝos jaro 2022, kiun ni finos kun miksitaj sentoj. Parte pozitivaj, ja post du jaroj la pandemia situacio finfine ebligis al ni ne nur virtualan, sed fizikan ĉeeston en eventoj, renkontiĝoj, en nia jarĉefkunveno dum la Germana Esperanto-Kongreso (GEK) en Oldenburg (05.06.2022), parte tamen negativaj, ja nur malmultaj gekolegoj alvenis por persone raporti pri siaj instruagadoj, interŝanĝi opinion, ideojn, kaj diskutadi pri estontaj celoj, planoj por nia Asocio. Ni povas nur esperi, ke post foriro de timo je infektiĝo kaj reveno de la emo je personaj, rektaj interparoladoj, interagadoj, nia membraro fariĝos pli aktiva kaj agadema.

Jam nun mi informas vin pri nia jarĉefkunveno organizota laŭ nia tradicio dum GEK. Detalojn pri la 100-a kongreso de GEA (inter 26-29 majo 2023) vi trovas ĉe https://www.esperanto.de/de/dek2023. Se vi aliĝos ĝis la 31a de decembro, vi povos ĝui la rabatitan kotizon (75€), poste ĝis la 31a de marto la baza kongreskotizo estos 85€.

Kompreneble vi povos senpage partopreni nur nian jarĉefkunvenon en sabato, la 27-an de majo 2023. Komenco je la 16-a horo. Bonvenon!

---

**1. MEMBRARO, KOTIZOJ**

Nia asocio perdas membrojn de jaro al jaro, malmultaj novaj aliĝoj alvenas. Temas pri ĝenerala tendenco en la Esperanto-movado. Tamen, AGEI ankoraŭ restas inter la plej grandaj landaj sekcioj de ILEI. Dankon al ĉiuj membroj, kiuj daŭre subtenas la Asocion de Germanaj Esperanto-Instruistoj, pagas sian jarkotizon kaj tiel ebligas la daŭran funkciadon de la asocio.

La membrokotizoj restas, kiel ĝis nun. Ĝi enhavas la abonon de IPR. Aliĝilo al AGEI estas ĉe
http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=78065795
Bv. rekomendi aliĝon ankaŭ al viaj konatuloj, instruemuloj, interesiĝantoj. Dankon!

Ni esperas, ke vi regule ricevadas la pedagogian revuon IPR kaj akiras novaĵojn, fakajn informojn ankaŭ per ĝi krom la kelkaj retmesaĝoj, kiuj mi porokaze plusendas al la listo kaj krom tiu ĉi resuma cirkulero.

Ni devas pripensi kotizaltigon. En mia jarraporto mi jam diris, ke nia membrokotizo estas 25 EUR kaj el tiu sumo ekde 2012 restis 5 EUR/membro por landa agado. Sed pro la altigo de ILEI-kotizoj en la fino de 2020, nia landa sekcio same bezonos altigon por havi propran enspezon. Se ni ne decidos pri altigo, la tuta enlanda kotizo devas esti ĝirata al ILEI kaj nenio el tio restas ĉe AGEI por enlanda uzo.
Pri tio la komitatkunsido devos decidi. Se ni faros tion en 2023, ekde 2024 ni povos akiri iom ankaŭ por la propra kaso.

**2. ESTRARO**

Ni devas danki al niaj estraranoj, ke ekde multaj jaroj ili estas je dispono por volontule labori, transpreni respondecon por nia asocio. Niaj estraranoj estas ankaŭ komitatanoj, kiuj reprezentas AGEI ĉe ILEI kaj en la lastaj jaroj ili faris tion ankaŭ virtuale.
Apartan dankon al nia kasisto, prizorganto de la membroadministrado pro la akurata laboro, ĝustatempa enkasigo de kotizoj, pretigo de la financa raporto, ktp. La mandatoj daŭras 2 jarojn. La sekva elekto okazos en 2024.

**3. RAPORTOJ**
Ĉiujare mi akurate sendas la asocian raporton al ILEI kaj aperigas ĝin ankaŭ sur nia retpaĝaro sub Dokumentoj, kun la financa raporto: http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652
La jarraporto estas ĉiujare prezentata ankaŭ dum nia jarĉefkunveno, same la financa raporto kaj raporto pri ĝia kontrolo. Tio estas bezonata por nia laŭjura funkciado.
Se ankaŭ vi ŝatus aldoni ion al la jarraporto, bv. sendi materialojn al mi ĝis la fino de la koncerna jaro , sed plej malfrue ĝis la fino de februaro en la sekva jaro.

Tre specialan raporton mi aldonas nun pri la t.n. eŭropa agado, ĉefe organizita de Klaus Leith. Temas pri la reta kampanjo por proponoj pri lerneja instruado de Esperanto en EU. Jen la listo kun statistikaj rezultoj:

**The EU needs improved language learning ---** 620 aproboj, 754 sekvantoj, 114 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893

**A lesson about Esperanto for the schoolchildren of the European Union ---** 225 aproboj, 675 sekvantoj, 58 alparoloj https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/39238

**Taalonderwijs in Europa ---** 179 aproboj, 660 sekvantoj, 77 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/260

**Boldogabb nyelvtanulók, sikeresebb nyelvtanárok ---** 134 aproboj, 648 sekvantoj, 71 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/63064

**Esperanto as first foreign language ---** 105 aproboj, 647 sekvantoj, 16 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/9279

**Sprachenvielfalt in der EU: Reichtum oder Problem? Das Ziel: Fremdsprachen besser und schneller lernen ---** 45 aproboj, 636 sekvantoj, 4 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes//Education/f/36/proposals/91312

**Enseigner l'Espéranto à l' école dans la communauté européenne ---** 22 aproboj, 632 sekvantoj, 5 alparoloj https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/102037

**Demander à l'Union Européenne d'encourager tous les pays à metter l'enseignement de l'espéranto dans les programmes dès le niveau primaire ---** 13 aproboj, 879 sekvantoj, 10 alparoloj
https://futureu.europa.eu/processes/Democracy/f/6/proposals/16798

**4. KURSOJ, KLERIGADO**
Kiel kutime, mi denove petas vin registri vian kurson (lernejan aŭ movadan) ĉe la paĝaro de edukado.net, kie estas komuna internacia kolektejo de kursoj: https://edukado.net/kursejo

4.1. Jen jam konataj kursofertoj en 2023:
februaro 10-12: semajnfina kurso en Esperanto-Centro Herzberg, Herzberg am Harz
aprilo 14-16: semajnfina kurso en Esperanto-Centro Herzberg, Herzberg am Harz
majo 27-junio 02: senkosta kurso por komencantoj dum GEK, Braunschweig, agnoskita Bildungsurlaub
junio 19-23: tutsemajna intensa, agnoskita VHS Bildungsurlaub, Osterode/Herzberg am Harz
julio 07-23: internacia somerkurso 2x1 semajna: intensa lernado kun ekskursoj, kulturaj programeroj.
**Semajnoj de Esperanto-Perfektigo - SEP** en la Esperanto-Centro Herzberg esas dusemajna kaj internacia, Oni povas resti dum la tuta periodo, aŭ elekti nur unusemajnan blokon. Post la antaŭtagmezaj instruhoroj la kursanoj manĝas kune kaj organizas posttagmezajn vizitojn al belaj, interesaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, vizitas muzeojn, banejojn, ekskursas en la arbaro, testadas promenvojojn en la Harz-montaro.

La programon riĉigas kulturaj kaj muzikaj eventoj, komuna kuirado, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. La partoprenantoj havas la eblon renkontiĝi, paroladi kun lokaj klubanoj, vizitantoj kaj aliaj Esperanto-parolantaj gastoj. Je la fino de la semajno ĉiuj ricevas atestilon pri partopreno. La tuttaga lingvouzo bone helpas ĉiujn perfektigi siajn lingvajn kapablojn kaj la tre amika, agrabla etoso certigas bonfarton.

4.2. klerigsesioj, studsemajnfinoj en 2023
Studadsemajnfinojn kun modulaj trejnsesioj por fariĝi E-kursestro, instruisto ofertas Germana Esperanto-Centro en Herzberg am Harz - Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo.
Detaloj: http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=55124818. Ĉeesta trejnado:
marto 10-12: klerigseminario de Esperanto-Centro Herzberg, en Herzberg am Harz
junio 2-4: klerigseminario de Esperanto-Centro Herzberg, en Herzberg am Harz

4.3. retaj kursoj:
senkosta Esperanto-kurso (KEK): leterkurso kun mentoro, lingva helpo
kurso de Rudolf Fischer: http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/
trovejo de Esperanto-kursoj: https://www.esperanto.de/de/enhavo/lerni/andere-kurse
ligiloj al kursoj, lernhelpiloj: http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=54861342

4.4. edukaj filmoj
- Fulmokursoj pri Esperanto (Crash courses in Esperanto):
https://esfconnected.org/2022/01/28/crash-courses

- ILEI havas kanalon ĉe youtube kaj donas servon diskonigi edukajn filmojn ĉe:
https://youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI
Vizitu ĝin, spektu la filmetojn tie. Filmetoj pri instruado kaj uzado de Esperanto en via lernejo aŭ universitato estas bonvenaj!
Proponu filmetojn al Alessandra MADELLA, vic-prezidanto de ILEI a.madella@tiscali.it

**5. EKZAMENOJ**
5.1. Ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto (GEI) estas en 4 niveloj. Ilin prizorgas Germana Esperanto-Centro en Herzberg. Detaloj, aliĝo ĉe esperanto-zentrum@web.de
A. Kursfina ekzameno
B. Ekzameno pri lingva kapableco
C. Supera ekzameno pri lingva kapableco
D. Kursestra ekzameno
Skiza priskribo de la niveloj, kotizoj, ktp:
https://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/Ekzamenoj/SuperrigardoEkzamenojGEI2007.pdf

5.2. UEA-KER: En 2022 ŝanĝiĝis la ekzamensistemo de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Ĝi estis lanĉita fine de 2008 kaj ĝis decembro 2022 okazis pli ol 80 sesioj en 32 landoj kun 2650 sukcesintoj. La partoprenintoj venis el 81 landoj.

En 2021 la ekzamenkomisiono de UEA planis enkonduki novajn erojn en la ekzamensistemon, aldoni la plej altan C2-ŝtupon kaj ebligi al la kandidatoj, loĝantaj dise en la mondo, ankaŭ el siaj hejmoj rete trapasi la ekzamenojn. Kvarpersona teamo ellaboris la novan nivelon, ties postularon kaj modelajn testseriojn. La membroj de la C2-teamo estis la samaj kolegoj, kiuj dekomence agadis por la lanĉo kaj funkciigo de la unulingvaj ekzamenoj ĉe la budapeŝta ekzamencentro. La tuta jaro 2021 estis bezonata por tiuj laboroj, en decembro 2021 kaj en januaro 2022 okazis la testado de la nova sistemo. En junio 2022 okazis la unuaj retaj ekzamenoj en niveloj B1, B2 kaj C1.
Samjare en aŭgusto dum la Universala Kongreso en Montrealo debutis la nova C2-nivelo. Specimenon vi povas trovi ĉe https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj/c2
Fine de novembro 2022 okazis la 10a Tutmonda Ekzamentago, kun ĉeestaj, paperaj ekzamenoj en ĉiu nivelo, kaj reta ekzameno je C2-nivelo kie ekzameniĝis 104 kandidatoj kaj sukcesis 91.

Por la jaro 2023 la KER-Ekzamen-Centro planas retajn ekzamenojn (verŝajne por junio), ĉeestan ekzamenon dum UK en Torino. En tiu jaro verŝajne ne okazos aliaj ĉeestaj ekzamenoj.
Priskribo de la novtipa ekzamensistemo: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/priskribo

## 6. ILEI-KONGRESO

6.1. ILEI-Kongreso 2022

Jam en la tria sinsekva jaro ILEI-Kongreso okazis nur virtuale. En 2022 inter 23-30 de julio kun la nomo VEKI-3 (la 3-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI). Ĝia ĉeftemo estis: “Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado”. Kiel kutime, okazis virtuale la Komitatkunsido, ankaŭ elekto de la Elekta Komisiono. Kadre de VEKI-3 estis aranĝita ankaŭ ILEI-Simpozio, kaj AMO-seminario ĉeforganizite de Stefan MacGill. Jen detaloj: https://www.espero.ir/eo/veki-3/

6.2. ILEI-Kongreso 5-12 aŭgusto 2023

Retejo de la Kongreso: https://2023.kongreso.org/ kun ĉiuj detaloj, aliĝilo, ktp.

Post tri sinsekvaj nur-virtualaj Kongresoj, en 2023 la 56-a Kongreso de ILEI denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, en la strandurbo Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro) situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu permesos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori, kaj ankaŭ ferii en la sama feria vilaĝo. La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon, plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.

La ĉefa temo de la Kongreso estos: “Instrui Esperanton en lernejoj”. La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj ĝenerala publiko; unuvorte ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la temo, ĉu profesie, ĉu ne. Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn, ktp.

Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuaĵojn ĉu pri la kongresa temo, ĉu pri aliaj pedagogiaj temoj, ĉu por la Lingva Festivalo, aŭ por la Internacia Vespero, ktp. Vi povas indiki pri viaj ofertoj kaj kontribuaĵoj kaj en la Aliĝilo kaj per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponataj kontribuaĵoj estas la 31-a de januaro 2023, por ke ili certe estu aldonitaj al la provizora programo de la Kongreso. Bv. aldoni:
- titolon de la kontribuaĵo - vian kompletan nomon
- daŭron de la prezentado
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo
- du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi
- vian foton

Mi deziras al vi bonan sanon, sukcesan finon de la jaro 2022 kaj bonajn esperojn, aktivan poresperantan agadon en 2023. Dankon pro via remembriĝo en AGEI kaj daŭra subteno de la instruagado en Germanio.

Kun multaj salutoj,

Zsófia Kóródy

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto

AGEI